

# AMERIKA ESPERANTISTO

SEPTEMBER, 1918



OFFICIAL ORGAN OF  
THE ESPERANTO ASSOCIATION  
OF NORTH AMERICA

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

MRS. I. M. HORN

## CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

### BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

### OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Sec. & Treas., 438 15th St. 19

### SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Rondo, meets Third Friday eve., Rm. 315 Lick Bldg., 35 Montgomery St. F-ino M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Av.

### CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 1116 W. 19th Place. La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

### BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

### WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

### PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss M. G. Ingalls, Sec'y, The Windsor, State St.

### DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-3 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esp. Unuiĝo, ĉiusemajne. Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd. La Septentrio, Tues., 8.00 P.M., 578 Alexandrine Ave., W.

### PLAINVIEW, NEBR.

Esperanto-Fako de la "Sola Skolto" (Lone Scout), 500 N. Dearborn, Chicago, Ill. (Revuo por la Junularo. Organizu grupon inter la geknaboj. Granda sukceso. Abonu tuj! Jare .75; Kvarmonate 25.) Fakestro, Chas. P. Lang, Plainview, Nebr.

### HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

### NEW YORK CITY, N. Y.

The Greater New York Esperanto Society, including all chartered clubs in Manhattan, The Bronx, Brooklyn, Queens, Richmond, Long Island, Westchester County and the New Jersey suburbs. Miss Leonora Stoepler, Sec., 105 W. 94th St.

The New York Barĉo, or Esperanto supper, is held on the THIRD FRIDAY of every month (7 P. M.), at the new headquarters of the Civic Club, 14 West 12th St. (two doors west of 5th Ave., south side); conveniently located to "L" and subway lines.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

### CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

### PHILADELPHIA, PA.

Phila Esp. Soc. J. F. Knowlan, Sec., 45 No. 13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217 Filbert St.

Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

### PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. James McKirdy, Sec., Box 920. Fridays, 8 P. M.

### WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanta Klubo, 1389 Quincy St., kunvenas jaŭdon vespere. 19

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)  
WEST NEWTON, MASS.

One Dollar a Year.

Single Copy Ten Cents.

VOL. 23.

SEPTEMBER, 1918

NO. 1

### THE FOUR CORNERSTONES OF PEACE

The thinking people of the world need to be approaching a common understanding as to the world-reform which we may aim for as a sequence of this horrible war. Paraphrasing the title of a valuable editorial in the New York Thrice-a-Week World for September 30, we venture to offer for consideration the following as the Four Cornerstones of Peace:

1. A strong international government. That government must have legislative, judicial, and executive power, the last greater than that of any one language group.

2. A surrender of some national rights and prejudices. The nations must give up offensive and defensive armaments, and must surrender to the world government at least **judicial** control of colonies not speaking the same tongue; also of economic barriers. Preferably all **international** railroads, trusts, banking, and other business, should be subject to the central control.

3. Democracy within each national unit. Governments everywhere must be of and by the people in order that the responsibility may bear directly upon the permanent tax-paying force: where peoples are not yet ready for self government, the **central** government should so determine, and prescribe education to that end. Governments should exert sufficient control over the distribution of wealth and health to prevent any injurious effect upon other communities or future generations.

4. A thoro understanding and better means of communication between **all** people. This is most important of all. The peoples of the world, of whatever color, whatever tongue, must get into har-

Jan 3 '21 P.O.L.B. - E.P.H.

mony,—must learn what other people are desiring and why other people have prejudices. To see the other person's point of view; be he Mohammedan, Confucian, Buddhist, or Christian; be he Span-American, Afro-American, or Anglo-American; it is an absolute necessity that we all have a speech of intercommunication. The fact that, in the present day world, the European scientific thought and speech are today the most highly developed and widespread makes that European tongue, divested of its national peculiarities, the best available means of communication.

We would suggest to the government of the United States, to Secretary Lansing's department in particular, that Esperanto is worth government investigation, recognition, and use, wherever possible.

We would suggest that the question of an international language be immediately made part of the program for the coming League of Nations.

N. W. F.

---

## GRAVAJ STATDOKUMENTOJ

---

### PAROLADO DE PREZIDANTO WILSON

Inaŭguracie al la Kvara "Libereco"-Prunto

New York, 27 Septembro

---

Miaj samcivitanoj:

Mi ĉi tie estas ne por akceli la Prunton. Tion faros—faros kapable kaj entuziasme la centmiloj da fidelaj kaj senlacaj viroj kaj virinoj, kiuj entreprenis prezenti ĝin al vi kaj al niaj samcivitanoj tra la lando: kaj mi ne havas ombron da dubo pri ilia plena sukceso; ĉar mi konas ilian spiriton kaj la spiriton de la lando. Mia konfido estas ankaŭ konfirmita per la zorga, sperta kunlaborado de la bankistoj ĉi tie kaj ĉie, kiuj aldonas sian netakseblan helpon kaj gvidon. Mi venis pli por serĉi okazon prezenti al vi kelkajn pensojn, kiuj miaespere taŭgos por doni al vi, eble pli forte ol ĝis nun, vivan komprenon de la concernataj grandaj demandoj, por ke vi sentu kaj akceptu kun pli alta entuziasmo la gravan signifon de la devo subteni la registaron per viaj viroj kaj viaj rimedoj en ĉia grado de sinoferado kaj abnegacio. Neniu viro aŭ virino vere ekposedinta la signifon de tiu milito povas heziti doni laŭ sia plejeblo; kaj mia komiso ĉi tie hodiaŭ nokte estas peni ankoraŭ unu fojon klarigi tion, kion milito vere signifas. Alian instigon aŭ memorigon je via devo vi ne bezonos.

Sur ĉiu paŝo de la milito ni ricevas rekonscion pri tio, kion ni intencas per ĝi elfari. Kiam niaj espero kaj atendoj plej vigliĝas, ni pensas pli precize ol antaŭe pri la sekvoj, kiuj dependas de ĝi, kaj pri

la celoj, kiujn oni devas per ĝi atingi. Ĉar ĝi havas pozitivajn, tute precizajn celojn, kiujn ni ne fiksas kaj kiujn ni ne povas ŝanĝi. Nenia ŝtatestato aŭ kongreso ilin kreis; nenia ŝtatestato aŭ kongreso povas ilin ŝanĝi. Ili naskiĝis el la naturo kaj ĉirkonstancoj mem de la milito. La ekstrema povo de ŝtatestatoj aŭ kongresoj estas ilin plenumi aŭ ilin perfidi. Ili en la komenco eble ne estis klaraj; sed ili estas klaraj nun. Jam pli ol kvar jarojn la milito daŭras, kaj entiriĝis en ĝin la tuta mondo. La komuna volo de la homaro jam anstataŭas la apartajn celojn de apartaj ŝtatoj. Individuaj ŝtatestatoj la konflikton eble komencis; nek ili nek iliaj kontraŭuloj povas laŭplacé ĝin ĉesigi. Ĝi fariĝis milito popola, kaj popoloj de ĉiuj specoj kaj rasoj, de ĉiu grado de potenco kaj diverseco de historio, implikiĝis en ĝiajn radikalajn procedojn de ŝanĝado kaj solvado. Ni eniris ĝin, kiam ĝia karaktero plene preciziĝis kaj estis klare, ke neniu nacio povas stari flanke aŭ indiferenti pri ĝia rezulto. Ĝia provoko trafis la koron de ĉio, por kio ni zorgis kaj vivis. Niaj fratoj el multaj landoj, kiel ankaŭ niaj propraj krimmortigitoj sub maro, alvokadis nin, kaj ni respondis furioze, kaj kompreneble la aero ĉirkaŭ ni sennebuliĝis. Ni vidis la aferojn en iliaj plenaj, konvinkaj proporcioj, kiel ili staris, kaj ni vidadas ilin fiksrigarde kaj samkomprene ĉiam post tio. Ni akceptis la problemojn de la milito kiel **faktoj**, ne kiel ia ajn grupo da homoj aŭ tie ĉi aŭ aliloke ilin difinis, kaj ni povas akcepti nenan rezulton, kiu ne rekte atakos kaj ilin solvos. Tiuj problemoj estas jenaj:

Ĉu oni permesu, ke la milita potenco de nacio aŭ grupo da nacioj disponu popolojn, super kiuj ili havas nenan rajton krom la fortrajto?

Ĉu la nacioj fortaj povu libere malbonfari al nacioj malfortaj kaj submeti ilin al siaj celoj kaj intereso?

Ĉu la popoloj estu regataj kaj potencataj, eĉ en siaj internaj aferoj, per arbitra kaj senrespondeca forto aŭ per sia propra volo kaj elekto?

Ĉu estu komuna normo de la rajtoj kaj privilegioj por ĉiuj popoloj kaj nacioj, aŭ ĉu la fortaj faru laŭplacé kaj la malfortaj suferu sen korekto?

Ĉu la asociiĝo por la rajtoj estu blinda kaj per hazardaj aliancoj, aŭ ĉu estu komuna interkonsento por devigi observadon de la komunaj rajtoj?

Nenia homo, nenia homgrupo elektas ĉi tiujn kiel la problemojn de la barakto. Ĝiaj problemoj ili memstaras; kaj ili estas solvotaj—tute ne per arangoj aŭ kompromisoj aŭ alfarado de intereso, sed definitive unu fojon por ĉiam, kaj kun plena kaj nemalkonfesebla akcepto de la principo, ke la intereso de la plej malfortaj egalsankte valoras la interesojn de la plej fortaj.

Ĉi tion ni celas, parolante pri daŭra paco, se ni parolas sincere, inteligente kaj kun vera kono kaj kompreno de l' afero traktata.

Ni ĉiuj samopinias, ke oni tute ne povas paciĝi per iaj marĉandoj aŭ kompromisoj kun la registaroj de la Centraj Imperioj, ĉar jam antaŭe ni traktadis kun ili kaj vidis iliajn traktadojn kun aliaj registaroj niaj kunbatalintoj, ĉe Brest-Litovsk kaj Bucaresti. Ili nin konvinkis, ke ili ne havas honoron kaj ne intencas justecon. Ili observas neniajn

interligojn, akceptas nenian principon krom la perforto kaj siaj propraj intereso. Ni ne povas interkondiĉi kun ili. Ili ĝin nebligis. La germana popolo jam nepre scias, ke ni ne povas akcepti promeson de tiuj, kiuj trudis al ni tiun militon. Ni ne pensas samajn pensojn nek parolas saman lingvon de interkonsento.

Estas gravege, ke ni ankaŭ eksplicite interkonsentu, ke oni tute ne paciĝu per ia kompromiso aŭ cedo ĉe la principoj, kiujn ni konfesis kiel la principojn, pro kiuj ni batalas. Tio staru ekster ĉia dubo. Mi tial permesos al mi paroli plej malkaŝe pri la en ĝi enplektitaj praktikaj sekvoj.

Se estas en vero kaj efektivo la komuna celo de la registaroj kunligitaj kontraŭ Germanujo kaj de la nacioj, kiujn ili regas (kiel mi kredas), atingi per la estontaj aranĝoj pacon sekuran kaj daŭrontan, estos necese, ke ĉiuj alsidontaj al la paco-tablo estu pretaj kaj volantaj pagi la prezon, la solan prezon, kiu ĝin havigos; kaj pretaj kaj volantaj ankaŭ krei en ia vireca maniero la solan rimedon, per kiu estas certigeble, ke la interkonsentoj de la paco estos respektataj kaj plenumataj.

Tiu prezo estas senpartia justeco pri ĉiu punkto de la aranĝoj, malgraŭ tio, kiu ricevos malprofitojn; kaj ne nur senpartia justeco sed ankaŭ kontentigo al la diversaj popoloj, kiujn oni disponos. Tiu nepre necesa rimedo estas ligo da nacioj formota sub interligoj efikantaj. Sen tia rimedo, per kiu la mondopaco estas garantiibla, la paco dependos parte de la promeso de senleĝuloj kaj nur de tiu promeso. Ĉar Germanujo devos rebonigi sian reputacion ne per kio okazos ĉe la paco-tablo, sed per kio sekvos.

Kaj, laŭ mia ideo, la konstitucio de tiu ligo da nacioj devas esti parto—eĉ estas, iel, la plej necesa parto—de la pacaranĝoj mem. Ĝi nun ne povas esti formata. Se nun formata, ĝi estus nur nova alianco limita je la nacioj kunligitaj kontraŭ komuna malamiko. Ne verŝajne, ke ĝi povus esti formata post la aranĝoj. Ĝi estas necesa por garantii la pacon; kaj la paco ne estas garantiibla per postzorgoj. La kaŭzo (por paroli ree malkaŝe), pro kiu oni devos garantii ĝin, estas ke partoprenos en la paco tiuj, kies promesoj montriĝis nefidindaj, kaj rimedojn oni devos trovi samokaze kun la pacaranĝado mem por escepti tiun fonton de nesekureco. Estus malsaĝo, konfidi la garantian al posta memvola ago de la registaroj, kiuj sub nia nazo detruis Rusujon kaj trompis Rumanujon.

Sed ĉi tiuj ĝeneralaj esprimoj ne klarigas la tutan aferon. Kelkaj detaloj estas bezonaj por forigi de ili la abstrakton kaj prezenti ilin kiel praktikan programon. Jen do kelke da punktoj, kaj mi diras ilin des pli konfide tial, ke mi povas diri ilin aŭtoritate, kiel esprimantajn la komprenon de nia registaro pri ĝia devo rilate la pacon.

Unue.—La aplikota senpartia justeco faru nenian apartigon inter tiuj, al kiuj ni deziras esti justaj, kaj tiuj, al kiuj ni ne deziras esti justaj. Ĝi devas esti justeco sen favorotoj, akceptonta nenian normon krom la egalaj rajtoj de la diversaj koncernataj popoloj.

Due.—Nenia speciala aŭ aparta intereso de iu sola nacio aŭ iuj grupoj da nacioj povas fariĝi la bazo de iu parto de l'aranĝoj, kiu ne akordiĝas kun la komunaj intereso de ĉiuj.

Trie.—Ne povas esti ligoj aŭ aliancoj aŭ specialaj interligoj kaj interkonsentoj kun la ĝenerala, komuna familio de la ligo da nacioj.

Kvare.—Kaj pli specifike, ne povas esti specialaj, egoismaj, ekonomiaj arigoj interne de la ligo, nek uzado de kia ajn ekonomiaj bojkoto aŭ elbarado, esceptinte se la povo ekonomie puni per elbarado el la mondobazaroj estos konfidata al la naciligo mem, kiel rimedo de disciplino kaj regado.

Kvine.—Ĉiuj kaj ĉiaj internaciaj interkonsentoj kaj traktatoj estu konigataj en tuto al la cetera mondo.

Specialaj aliancoj kaj ekonomiaj konkuradoj kaj malamikecoj estadis en la moderna mondo la ĉefonto de la planoj kaj okazoj, kiuj naskas la militon. Estus tiel nesincera, kiel nesekura, paco, kiu ne esceptus ilin per precizaj kaj devontigaj esprimoj.

La certeco, kun kiu mi kuraĝas paroli por nia popolo en tiuj aferoj venas ne pure de niaj tradicioj kaj la konataj principoj de internacia agado, kiujn ni ĉiam konfesis kaj obeis. En la sama frazo, kie mi diras, ke Usono neniam faros specialajn arangojn aŭ interkonsentojn kun apartaj nacioj, mi diru ankaŭ, ke Usono estas preta preni sian plenan parton de respondeco rilate observigadon de la komunaj interligoj kaj interkonsentoj, sur kiuj la paco devos de nun sin bazi. Ni ankoraŭ legas la senmortan averton de Washington kontraŭ "implikemaj aliancoj" kun plena kompreno kaj konsekvenca intenco. Sed implikadas aliancoj nur specialaj kaj limitaj; kaj ni ekkonas kaj akceptas la devon de nova tago, en kiu ni rajtas esperi ĝeneralan aliancon, kiu evitigos la implikojn kaj preparos la mondon al komunaj interkonsentoj kaj observigado de komunaj rajtoj.

Mi analizis tiamaniere la internacian situacion, kiun la milito kreis, kompreneble ne tial, ke mi dubis, ĉu la gvidantoj de la grandaj kunligitaj kun ni nacioj kaj popoloj samopinias kaj samcelas, sed ĉar la aero iam kaj iam nebuliĝas per senfundamentaj duboj kaj malicaj malbonkonsiloj, kaj renecesas jam ĉian senrespondecan babiladon pri pacintrigoj kaj moliĝanta kuraĝo kaj ŝanceliĝa celado flanke de l' aŭtoritatuloj absolute, kaj laŭ bezono eĉ anateme, dispeli, kaj paroli en vortoj la plej simplaj, eĉ kelkafoje ripetante tion, kion oni ĉe antaŭaj okazoj diris egale simple, kvankam malpli krude.

Kiel mi diris, nek mi nek alia registro kreis aŭ konkretigis la problemojn de tiu milito. Mi simple respondis al ili, kiom mi povis klarvidi. Sed mi respondis ĝoje kaj kun decideco, kiu igadis pli kaj pli varma kaj aplomba laŭ tio, ke la problemoj pli kaj pli reliefigis. Estas jam klare, ke ili estas problemoj, kiun neniu povas forklini krom intence. Mi devas batali pro ili, kaj feliĉe batalos pro ili, kiel la tempo kaj la cirkonstancoj malkaŝis ilin al mi kiel al la tuta mondo. Nia entuziasmo al ili ĉiam pli potenciĝadas laŭ tio, ke ili elstaras en ĉiam pli vivaj kaj nemalvideblaj konturoj.

Kaj la fortoj, kiuj batalas pro ili, pli kaj pli densariĝadas, organizadas siajn milionojn en pli kaj pli nevenkeblan energion, kiom ili pli kaj pli klariĝadas por la pensoj kaj celado de la koncernataj popoloj. Estas unikajo de tiu milito, ke dum la ŝtatistoj ŝajnis cerbumadi por difini siajn celojn kaj ŝajnis iafaje ŝanĝi sian lokon kaj sian vidpunkton,

la pensoj de la amasoj, kiujn la ŝtatistoj ekzistas por instrui kaj gvidi, ĉiam pli sennebuliĝadis, ĉiam pli certigadis pri kio estas tio, kial ili batalas. La naciaj celadoj pli kaj pli malaperadis kaj la komuna celado tuthomara ilin anstataŭis. La konsiloj de l' ordinaraj homoj fariĝis sur ĉiu paso pli simplaj kaj lojalaj kaj pli unuecaj, ol la konsiloj de la finstruitaj moŝtoj, kiuj ankoraŭ imagas, ke ili ludas ian ludon de potenco kaj ludas por karaj vetajoj. Jen kial mi diris, ke tio estas milito popola, ne ŝtatista. La ŝtatistoj devos obei la klariĝintan komunan opinion, aŭ pere.

Tiel mi komprenas la signifon de la fakto, ke multespecaj kunvenoj kaj asocioj, kunmetitaj el ordinaraj oficuloj, postuladis, preskaŭ ĉiufoje kiam ili kolektiĝis, kaj postuladas ankoraŭ, ke iliaj regnestroj eldeklaru al ili, kion, ĝuste kion ili celas per tiu milito, kaj kio laŭ ilia ideo devus esti la detaloj de la finaj aranĝoj. Ilin ankoraŭ ne kontentigis tio, kion oni al ili konigis. Ili ĝis nun ŝajnas timi, ke ili ricevas kion ili postulas nur en ŝtatista formo—nur en formo de teritoriaj aranĝoj kaj ekvilibriĝoj politikaj, sed ne en formo de grandvidaj justeco kaj kompato kaj paco kaj kontentigo al premataj, turmentataj homoj kaj sklavaj popoloj—kio ŝajnas al ili la solaj aferoj indaj je milito englutinta la tutan mondon. Eble la ŝtatistoj ne ĉiam ekvidis tiun metamorfozon de la tutmonda taktiko kaj agado. Eble ili ne ĉiam parolis en rekta respondo je la metitaj demandoj tial, ke ili ne sciis, kiel penetremas tiuj demandoj kaj kiajn respondojn ili postulas.

Sed miaparte, mi plezure penados respondi fojon post fojo, esperante pli kaj pli evidentiĝi, ke mia sola volo estas kontentigi la batalantajn soldatojn, kiuj, eble antaŭ ĉiuj aliaj, rajtas ricevi respondon, kies sencnon neniu povos pardoneble malkompreni, se li komprenas la lingvon, en kiu ĝi paroliĝos, aŭ povas tradukiĝi ĝin korekte en sian propran. Kaj mi opinias, ke la estroj de la registaroj kun ni kunligitaj parolos laŭokaze tiel simple, kiel mi penis paroli. Mi esperas, ke ili senĝene diros, ĉu ili pensas, ke mi en ia grado eraras per miaj ideoj rilate la koncernatajn problemojn aŭ per mia intenco rilate la rimedojn por atingi kontentigan solvon de tiuj problemoj.

Unueco de celado kaj de konsiloj tiel nepre necesas en tiu milito, kiel necesis komandunueco sur bataalkampo; kaj kun perfektaj cel- kaj konsil-unueco aperos konfido pri plena venko. Nur tiamaniere ĝi estas akirebla. La "pacatakoj" estas efike rebateblaj kaj silentigeblaj nur kiam oni montras, ke ĉiu venko de la nacioj kunligitaj kontraŭ Germanujo pliproksimigas la naciojn al tia paco, kiu alportos sekurecon kaj rekonfidon al ĉiuj popoloj kaj ripeton de alia tia barakto de senindulga perforto kaj sangverŝado por ĉiam nebligis, kaj ke nenio alia tion povas. Germanujo konstante sugestadas la "kondiĉojn," kiujn ĝi volas akcepti; kaj ĝi ĉiam trovas, ke la mondo "kondiĉojn" ne deziras. Ĝi deziras definitivon triumfon de la justeco kaj justagado.

—o—  
Tiun ĉi homon oni devas aresti! Li jetis karboneron je kato.

Ĉu vi intencas plendi al S. P. C. A.?

Tute ne. Mi parolos pri tio al la hejtaja komisiestro.

—El Boston Ideas.



## LA SPEKTAKLO AŬTUNA

Sur la kampoj, kaj en la arbaroj dum oktobro la scenejo estas preta por la grandioza baletto de la aŭtunaj folioj kaj por la fama ĉiujara ripetado de la aŭtuna foliario. Eble ankaŭ ni povus havi la grandan simfonion de naturo en ĝia adiaŭa prezentado de la rikolta pantomimo.

La forta kaj energia kapelestro, la vento, sin preparas por ludi kun la folioj en unu grandioza montrado kaj superpleno de luksegaj kaj brilegaj harmonioj, devigante la koron de homoj ekkrii pro mirego kaj entuziasmo: "Ĝi estas perfekteco. Ĉu vi iam vidis ion tiel belan?"

La skarlataj aceroj, sumakoj kaj vinberuoj, la oraj kaj bronzaĵoj kaj kverkoj kaj betuloj kun siaj diversaj nuancoj intermiksiĝas kun la malhelaj verdajoj de la pinoj kaj larikoj, kaj kun la mola grizo de la rokoj sur la montetoj kaj la nigreta tero de la kampoj limigata de la hedere kovritaj ŝtonaj muroj kaj kun la delikata pala roza kaj orangkoloro de la marĉoj.

Homoj devas respektigi la naturon.

Unuj pensos pri ŝi kiel granda artistino; alia rigardos la grandan panoramon sternitan antaŭ li kiel multkoloran pentraĵon; li volos ke viroj povus esti tiel facile kaj bele vestataj. Iu alia pensos pri idealaj desegnoj por tapiŝoj aŭ tapetoj de oriĝintaj fadenoj kaj brilegaj silkoj. La mastrino pensos pri la malnovmoda stebita litkovrilo.

La poeto estos inspirata pensi en mirindaj lirikoj. Al la epikuristo venos vizioj de bonegaj vinoj, de ruĝaj kaj flavaj likvoroj. La studanto de la Biblio pensos pri la multkolora vesto de Josefo, aŭ pri Moseo kaj la brulanta arbeto, kaj ankoraŭ alia estos memorigata pri la fabelo koncerne de la mortanta delfino.

La infanoj kredos, ke la scenoj de iliaj feitorakontoj estas veraj—la oriĝinta arbarego, la kupra kaj arĝenta arbaro, kaj la brilega tuŝo de la "Mirlibro," kiam la suno kolorigas ĉiun etan folion, kaj la tuta foliario ekflamas kiel juveloj. Kiam la ĉielo estas griza, ŝajnas kvazaŭ la brilo de la suno prokrastas, kvazaŭ la ĉiela fajro ekflamigas la arbaregojn tiel ke oni povas senti la varmecon en sia animo. Ĝi estas la sezono karnavala, kvazaŭ la suno kiu donis vivon al la arboj dum la tuta somero subite estas ĵus naskita.

Ĝi estas la posta heleco, antaŭ la aŭroro, antaŭ ol la malvarma vintro nudigas la tutan teron, kaj aranĝas la scenejon por la malafabla rakonto de vintro severa.

Baldaŭ la folioj amasiĝos sur la tero, kaj la infanoj ludos kun ili kaj pensos pri la "Infanoj en la Arbaroj," la suko eniros la radikojn atendente la varmecon de la suno, kaj naturo denove ekfloros en la glora printempo.



Edspa.

Inspektoro—Kiam mi staras sur la kapo, la sango fluas al la kapo. Kial, do, la sango ne fluas al la piedoj kiam mi staras sur la piedoj?

Knabo—Ĉar viaj piedoj ne estas malplenaj.

—Esperanto Monthly.

## VESPER HIMNO

Vesperventoj sopirantaj  
 Venu el la fremda land',  
 Pri amikoj forestantaj,  
 Diru al ni atendantaj,  
 Nin respondu je demand'.

Bluĉielo kliniĝanta,  
 Diru kion vidas vi,  
 Mondon ĉie rigardanta,  
 Homon ĉiam prizorganta  
 Gardu kiujn amas ni.

Nokto, stele lumigata  
 Portu sonĝojn trans la mar',  
 Diru pri la land' amata  
 Al nacio, Dibenata,  
 Donu pacon al homar'.

Dio en ĉiel' loĝanta  
 Gardu Vi de supre nin;  
 En la mondo laborante,  
 En laboro esperante,  
 En esper' ni laŭdas Vin.

Daisy Flanders.



## ESPERANTISMO

Esperantismo, kiel mi ĝin komprenas, estas la animo de Esperanto kaj la fajrero kiu konservas la lingvon viva. Esperantismo estas la plej granda ideo kiu iam envenis en la mondon, kaj la benoj kiuj alkreskos el ĝia efektiviĝo superos ĉiun alian kiu estos donacita al la homaro; ĉar tiu ĉi bonega kaj glora afero, la kuniĝo de ĉiuj homoj en unu familion, progresados ĝis kiam la lingva barilo estos detruita.

Intertempe, dum oni laboras por la kompletigo de tiu ĉi granda espero, Esperanto, la korpo de Esperantismo, ne estas senutila por tiuj kiuj aliĝas kun ĝi. El la studado de la lingvo kaj plezuro kaj profito estas akirataj.

Esperanto helpas la lernanton pli bone kompreni sian propran lingvon kaj faras fremdajn lingvojn malpli malfacilaj. Sed kial li malŝparas tiel multe da tempo kaj laboro studante fremdajn lingvojn kaj, post li akiris duonan sciadon de ili (ĉar tio estas ĉio kion la plimultaj el la studentoj ricevas) ili tute ne estas utilaj al li.

Se ĉiu studas nur du lingvojn, Esperanton kaj la sian, li povus ellerni ilin, kaj lerninte ilin, trovos ilin praktikaj al si. Tiam li povas

korespondi kun homoj el ĉiuj anguloj de la terglobo, kaj samtempe li povas legi librojn kaj revuojn verkitajn de la enlanduloj de aliaj landoj, tiamaniere sciigante pri iliaj diroj kaj moroj.

Kiajn utilojn farus tiu ĉi lingvo al la homoj kaj nacioj? La interkomunikigo de la mondo multobligus. Vojaĝistoj povas iri ĉien, kaj kompreni ĉiujn. Malamiketo inter la nacioj pro malkompreniĝo ĉesus. La scio disvastigus kaj la nacioj fariĝus pli kleraj.

Iwilda M. Huston,  
Pittsburgh, Pa.

---

### FOR THE ESPERANTO STUDENT

(The best translation received of the following exercise will appear in the next issue of *Amerika Esperantisto*. Papers must be sent before the thirtieth of November in order to receive consideration.)

#### Exercise for Translation

Esperanto is not merely adaptable but very specially suited for singing. The full, open vowels give it a general resemblance to Italian, and indeed many words are practically identical in the two languages. Further, Esperanto lends itself to a great variety of metre and poetical style, the free order of the words and the elision of vowels permitted under certain conditions being of great use in this respect. A large number of well known songs in different countries have been translated into the language, and there is an increasing supply of original Esperanto verse. Singers are therefore strongly recommended to add Esperanto songs to their repertoire, and it is certain that not only they but their audiences will be quick to appreciate the musical charms of the international tongue.

---

### LA TEKNIKA REVUO

This is a 6 in. by 10 in. monthly publication, entirely in Esperanto; it is successor to the *Internacia Scienca Revuo*, and is intended to include industry and commerce as well as science. The editor is Dr. Rene de Saussure, well known in the Esperanto world as a progressive and the author of the principles of "necessity" and "sufficiency" in word structure.

The first article of this first number of the new series, July-August, 1918, is an editorial, announcing that the publication will need at least 300 more subscribers if it is to be continued after the first of the year. Therefore every subscriber is urged to try to get others to subscribe. Furthermore, the editorial urges the subscribers to become fellow-workers in producing articles and notes of events that will interest technicians of every sort, but not anything too highly

specialized. "Thus will the contents of the Review have a more attractive and instructive aspect for the majority of Esperantists, whether technical or nontechnical."

Following the editorial is the "Science" section (the other sections being "Industry and Commerce," "International Associations," and "Technical Dictionaries"). This section covers five of the twenty pages of the pamphlet and has one article, "A Trip to the Top of Mt. Blanc in 1787," by Horace-Benedict de Saussure, translated into Esperanto by his great-grandson? (postnepo), the editor. Not only is the account scientifically accurate and romantically interesting, but it abounds in words and phrases that show a masterly and original mind: e. g. ĝojtemo (topic of enthusiastic conversation); sagrapide (with the speed of an arrow); ekzercita al tiaj marŝoj (accustomed to walks of that kind), etc. In fact the entire number serves well for word study.

The next five pages ("Industry and Commerce") contain three articles. The first one, entitled "Search for (Al serĉo de) a Larger Product of Labor," is quoted from the Bulletin of the Catalonian Esperanto Federation and deals with a subject long since familiar to Americans—scientific management—motion study. The second is entitled "The Firm of Dr. A. Wander, A.-G., Bern." Probably the great majority of Americans have never heard of this firm, which apparently is as much of an every day affair on the Continent as scientific management is in the United States. It began in 1865, with the manufacture of malt extract, and today it turns out a variety of products, having branch factories in other cities, the branch in London being much larger than the original in Bern. In 1917 a great factory was established in Chicago, almost entirely with Swiss capital. A beautiful brochure describing the business, which is published in Esperanto, may be had from the Bern headquarters. "Diverslanda Kroniko," with geographical subheadings, comprises the third article of the "Industry and Commerce" section. The news from Great Britain includes a page on the modern language investigation, of which we have heard more or less this past year as giving considerable publicity to Esperanto, with recommendation that it and other artificial languages be considered by a special committee. The news from other countries is decidedly briefer. For France five lines on a new motor plow have to suffice; for Germany six lines about sawmills; for Russia, Japan, Brazil and Argentina similar brevities, telling of stock corporations, chambers of commerce, statistics of capitalization and Swiss industrial propaganda, respectively.

The section on "International Associations" takes somewhat over four pages and is what might be called the "piece de resistance" of this first issue. It appeals for a definite headquarters for all international organizations, such as was beginning in Brussels on the foundation of 1910; and under the caption "Union of International Organizations" it offers a program which may be summarized as follows: (a) study the facts of international life so as to know what should go into the idea of a world organization; (b) work out a formula for

bringing into line groups of various aims and methods; (c) keep the members interrelated through the headquarters and their work well defined so as to avoid duplication of effort, promote interworking and see that all interests are represented; (d) promote the study in common of every question that concerns unification—in method, in systematizing units of measure, scientific terms, etc.; (e) provide an international secretarial headquarters and archives facilities for all associations; (f) promote internationally by all these ways the advancement of science and art, and insure peace. After this summary the editor describes in half a page the Teknika Asocio Internacia, which we may presume is expected to succeed the Scienca Asocio Esperantista founded during the second Esperanto Congress (Geneva) in 1906.

In the last section (Technical Dictionaries) the editor, under his familiar pseudonym, Antido, outlines the plan for taking up anew the important matter of specialized dictionaries. It is proposed first to sift out the best features of the Verax and other departmental dictionaries, forming thereby a general dictionary of technical terms, which shall be a foundation for all specialized dictionaries. The next step will be to prepare in pocket size a book that shall contain, besides the fundamental list, a brief grammar and a condensed table of weights, measures, monetary and other units of various countries. It will be a true international code, which doubtless will be translated into various national tongues, playing the same role for the technical man that the International Marine Code does for the navigator.

On page 18 is conscientiously given a list of "unofficialized" words used in this issue. In looking over the list it is surprising indeed to see what is included as unofficial, for many of the words are in every day use: e. g., biografio, filio, grimpi, plenumi, revuo, socio, tramo—and one is tempted to accuse the editor of false modesty. This list and what he has to say in the Editorial Corner (of one page) on critical questions concerning the language, point to a conservatism on the part of Antido that seems in staggering contrast to projects of his discussed a few months ago in "Esperanto," the official organ of the Universal Esperanto Association.

Finally, a page is given of periodicals and books received, with brief notes on the latter, while, possibly as a fixture, cover pages 2, 3, and 4 describe the well accepted principles of word structure, for which the editor is already famed. Ending the fourth cover page is a most welcome list of 19 Esperanto periodicals and their addresses. Would that it were complete! Why is there nothing listed from Spain, when on page 19 two successive issues of the *Bulteno de la Kataluna Esperantista Federacio* are among the *Gazetoj ricevitaj*?

Subscribe to *La Teknika Revuo* by all means, sending five francs to its publication office, 10 Hotelgasse, Bern, Switzerland. (Two and a half francs more includes membership in *La Teknika Asocio Internacia*.)

G. W. Lee.

We have received at this office a number of Esperanto and other periodicals, not hitherto acknowledged, in which we note the following valuable articles:

- Esperanto—June—Modern Art, The Lady of Japan, Sunites and Shiites, Kipling's "Muhammad Din."
- Esperanto—July-Aug.—Optimism, Ukraine (hist.), Electric Activity of the Human Body, War Work, Membership Figures.
- British Esperantist—Aug.—Diverse Ideas of "Liberty," the 13th Scotch Congress.
- British Esperantist—Sept.—Scout Esperanto League, Obituary of Clarence Bicknell.
- Esperanto Monthly—Aug.—Labor and Languages, Workingmen and Esperanto, Esperanto in the Schools, Jokes from Donaldson's Hospital.
- Esperanto Monthly—Sept.—League of Nations and Esperanto, A Treaty Model, Nunaj Demandoj (Duties of an Esperantist).
- France Esperanto—May-July—One Command One Tongue, Muhamedan Prayers, Groups in Algeria.
- La Espero (Stockholm)—June—Democratic Latin, Revoj kaj Songoj, La Krucoj.
- La Espero (Stockholm)—July—Review of v. Tschudi's articles, Program for Goetenburg Congress.
- Eklezia Revuo—June-July—The Church in Unchristian Lands.
- La Verda Stelo—No. 2—History of Club at Bahia Blanca.
- Arbitrator—Oct.—Ideals of Political Parties.
- Cooperator—Sept.
- Boston Ideas—Oct. 22.



S-ro Lee, estro de la propaganda komitato de la E. A. N. A., proponas ke la tuta Esperantistaro tra la tuta mondo donu al Esperanto ĉiun kvinan sabaton de monato, kiel antikve ĉe multaj nacioj la kvin nemonatajn tagojn oni distingis kiel festtagojn. Tiu estas grava propono. Okazas kvar aŭ kvin tiaj sabatoj ĉiujare. Ĉu vi aprobas aŭ malaprobas, sciigu S-ron Lee.

Ni deziras por ke ni presigu adresaron la nomon kaj adreson de ĉiu Esperantisto en Usono: ni petas ke ĉiu sendu al ni la sian antaŭ la jarkon. Bonvolu ankaŭ sendi la nomon de iu Usona Esperantisto kiu estas nun en alia lando. Ĉiu Esperantisto, kiu nun aŭ antaŭe aliĝis pli ol unu jaron al Esperanta klubo, ĉiu samideano kiu povas legi kaj skribi la lingvon, sendu vian nomon. Se vi nur estas aŭ estas estinta lernantulo aŭ klubano de malpli ol unu jaron, bonvolu citi tion. Se vi konas aŭ scias pri Esperantisto kiu eble ne abonas ĉi tiun gazeton, ni estus dankemaj se vi parolus al li pri tio, aŭ se vi mem skribus al ni lian nomon. Ni deziras havi adresaron plenan. Ni povas diri kredeble en tiaj tempoj la afero estos pli grava ol nura adresar-presigado.

Amerika Esperantisto deziregas donacitajn verketojn—prefere ne tradukojn—kaj komunikojn—ne komunikojn donaceutantajn—de alilanduloj pri iliaj landoj, kaj por ke ni povu plie eniri la mondfluan, kaj por ke nia Esperanto estu plibonigita. Ne hezitu citi por ni niajn malpravojn; estas favoro al ni.



We wish to get in touch with an American Esperantist—there must be some such—who is principally interested in the commercial use of Esperanto. There has been a great deal accomplished in Europe in this line at all those great centers which are preparing for after-the-war trade. London has a strong Common Commercial Language Committee, with S. R. Marshall (care of Cook's, Ludgate Circus, London, E. C. 4) as secretary. The Japan Salesman, current all about the Pacific, is devoting a page to Esperanto. Last year there were 300 students of Esperanto in the Chinese national university at Pekin alone. The field of American foreign commerce, with our new shipping tonnage, is practically untouched. If there is anyone of business interests, either active or retired, to whom this appeals, let us hear from him; he may play a large part in the future of America's commerce.

The Melbourne Esperanto Society is conducting a literary contest for all Esperantists in Anzac-land, offering valuable prizes, the first and second for an original poem on the Woods of Australia, the third and fourth for the best translation of Hawthorne's "Snow Image." We shall welcome these coming additions to our literature.

School and Society, Aug. 10, 1918, contains a forcible exposition of the uses of Esperanto that should appeal to any educator and to any parent of children in the schools. For this we have to thank the unflagging zeal of Mrs. I. M. Horn.

We are gaining new converts in Camp Devens, thanks to our enthusiastic samideano, R. Schmitt. He has already got one of the other muzikistoj studying Esperanto despite the manifold duties and excitements of camp life. We wish every Esperantist were as live a propagandist as he.

We hear that Roger Goodland, former secretary at Boston, has been badly gassed in the trenches, but is now recovering at his home in England.

In the New York Sun for Aug. 28, 1918, appeared a column on "Esperanto and the War" by Mr. Silbernik. Anyone desiring facts as to Esperanto's war activities is referred to this or the author.

"I put the key in the lock and it turned as if oiled," responds one recipient of a business letter in Esperanto with key enclosed. Have you ever tried it, you Esperantist who has foreign customers?

Pamphlet No. 99 of the London Chamber of Commerce, Oxford Court and 99 Cannon Street, London, E. C. 4, is the publication of an address by A. Barton Kent, our samideano, entitled "A Common Commercial Language." At the price of 3d., it should prove excellent propaganda in business circles.

At the request of the United States Committee on Public Information, the Division of Films, we recommend that our readers, whether or not film fans, take in "America's Answer," a picture especially prepared to show all forms of our war activities in France from the famed huge American-made harbor to the battle line itself. Ask your movie-man for it.

In the German Aero Club Times of August 22, 1917, and the July Esperanto Spiegel appeared a notable article by Herr von Tschudi, a German airman, about the value of Esperanto for an airman who knows not among what people he may alight. After three years' hard study of Russian he feels less expert than with three weeks of Esperanto. He believes people should be driven to learn Esperanto, since they lack initiative.



As the appointed editor feels a little weak on his feet and also upon his grammar, he has begged the collaboration of two, more expert Esperantists, Mr. H. M. Scott and Mrs. I. M. Horn, and feels that the magazine may thereby be kept closer to its former high standard. If errors occur, one may safely credit them to our own inexperience.

—N. W. F.



### EL HEINĖ

La florojn adori ni emas,  
Sed ilin samtempe ni premas.  
Kaj ili la kulpon mem portas:  
Sengarde flor' kreskas survoje,  
Sub radon eĉ jetas sin foje;  
Pro tio multegaj do mortas.

Amikoj foje kondolence  
Dolorojn niajn scias trovi,  
Por poste kvazaŭ senintence  
Mortige nin ekpiki povi.

Esperantigis B. Breslau (el Moskvo).



En Bostona jurnalo por negruloj oni reklamas:  
"Ne trompiĝu per reklamoj de centkvindek dolaraj funebroj po sepdek kvin dolaroj. Ne faru preparadojn antaŭ ol vi estos vidinta niajn sesdek dolarajn funebrojn."



Maroficisto enfalis akvon. Li estis savita de ferdekisto. La oficisto demandis de sia savanto kiamaniere li povas rekompenci lin.

"La plej bona, sinjoro," diris Jako, "estas diri nenion pri la afero. Se la aliaj maristoj sciigis ke mi eltiris vin, oni enjetus min."

—Marista Gazeto.

Juno varbita deziris aliigi sin al infanterio. Sergento konsilis lin, ke li eniri "Kavalerion."

Rekruto respondis, "Ho ne, tute ne!" "Kial?" diris Sergento. "Ho ne! ne deziris mi la kavalerion," respondis rekruto. "Kiam mi batalos kaj oni ordonis nin 'malantaŭeniru' mi ne deziras esti malhelpata de ĉevalo!"—O. Djornski.

Irlandano iam aĉetis jardona drapo kaj pensante, ke ĉio vendiĝas po jardo li eniris en laktejon kaj diris:

—Donu al mi jardona drapo, mi petas.

La butikisto ridetis, trempis sian fingron en la lakton kaj mezuris sur la vendotablo unu jardon da drapo.

—Envolvnu ĝin en papero, mi petas, diris Patriko.

Inspektoro sin turnis al infano kaj diris iom severmiene—Kiu verkis "Hamleto"?

La knabo ekploris, kaj diris hezitante:

—Ne estis mi, Sinjoro.

La saman vesperon la inspektoro, kiu vespermanĝis kun loka bienulo diris — Tre stranga afero okazis hodiaŭ. Mi demandis al knabo, "Kiu verkis 'Hamleto'?" Li ekploris kaj diris, "Ne estis mi, Sinjoro." La bienulo ridegis kaj respondis,

—La malgranda fripono, mi supozas tamen, ke estis li.

"Mi havas tie ĉi bonegajn aferojn kiuj vendiĝas po dek cendoj," komencis la vizitanta vendisto.

"Mi nenion volas," respondis kolerete la virino.

"Mi pensis ke vi nenion aĉetos," diris la vendisto, sin turnante al la pordo por eliri, "ĉar la sinjorino kiu loĝas ĉe la kontraŭa flanko de la strato diris ke via edzo neniam donas monon al vi."

"Ĉu ŝi diris tion?" eksplodis la virino. "Donu al mi kvin da tiuj ĉi aferoj, kiujn vi vendas. Mi edzo ĉiutage donas al mi pli da mono ol tiu katinaĉo ricevas ĉiumonate."

Wingrove Cook—Anglo—diras pri flinujo:

"Lando kie la rozoj ne havas parfumon, kaj la virinoj ne portas subjupon; kie, la laboristo ne havas dimanĉon, kaj la magistrato ne havas sencon de honoro; kie, la magneta montrilo montras la Sudon, kaj la signo de enigmaĵo estas la piedon ungograti; kie, la ŝido de honoro estas maldekstre, kaj tiu de sciado, en la stomako; kie, demeti la ĉapelon estas gesto malĝentila kaj porti vestojn blankajn estas surmeti funebro."

El angla lingvo tradukita de J. H. Young, Indiana, Pa.

[Sed kie la Esperanto estas same kiel la nia.]—Red.

## DUA DANIELO

Ekvilibristo estis edzo de bela ekvilibristino, kaj ŝi, la ekvilibristino, estis la pli forta, la pli muskola. La kuna vivo fluis trankvile kvazaŭ kvieta rivereto, krom ke Sinjoro Ekvilibristo insistis ĝui ofte specon de alkohola festo. La edzino argumentis, rezonis kaj minacis tute sen efekto, kaj fine ŝi promesis ke, se li sin cedos al tento, nur unufoje, ŝi lin pugnobatos, ja lin pugnobatos plenege. Tiu ĉi minaco lin tenis en vojetoj virtemaj dum tuta monato, sed fine la tentisto, Reĝo Alkoholo, venkis kaj lin deturnis, kelknokte, por festi per la preferata trinkajo. La tutan nokton la edzino maldormis kaj atendis malfidulon, sed li ne aperis. La matenon ŝi lin serĉis tra la tuta cirko, fine ŝi lin trovis dormantan en la leona kaĝo, apogigante la kapon sur la ventro de grandega leono. Tremante per kolero, ŝi trarigardis lin tra la feraj bariloj kaj siblis la unu vorton,—“malbravulo!”

J. C. Sanderson, Minneapolis, Minn.

Smarty: Say, Dad, better sell your coin collection.

Dad: Why, my son?

Smarty: I learned, in Esperanto class, that a coin collection is a financial mistake; moner-aro estas mon-eraro. — Ho Ho.

## We Take Subscriptions for Any Periodical

Published in the United States or Canada

On many of these we offer very  
Attractive Club Rates

All Profits from this branch of our  
work Devoted to Esperanto

Subscribe for your favorite magazine  
thru this office—get the most favorable  
rates for yourself, and at the same time

### HELP ESPERANTO

Our New Catalog will be sent to every subscriber on our list  
in November. Wait for it.

The American Esperantist Company, Inc.

WEST NEWTON, MASS.